# TEA-BULTENO

2ª JARO (AŬGUSTO)-SEPTEMBRO 1999 NUMERO 9-10



## AGENDO



1 M
2 Ĵ
3 V Revene el ... : rakontu viajn impresojn!
4 S
**5 D**
6 L
7 M Reek' al labor': ordigo de la arkivo




8 M
9 Ĵ
10 V Preparoj por Festo de Amikeco
11 S Arnoldstein: Esperantista Kunveno
**12 D Festo de Amikeco - Dreiländerecke**




13 L
14 M Ludkarta vespero



15 M
16 Ĵ
17 V Pri la 84ª UK en Berlino
18 S
**19 D**
20 L
21 M Ordigo de la arkivo



22 M
23 Ĵ
24 V Surprizaj diapozitivoj



25 S
**26 D**
27 L
28 M Ordigo de la arkivo



29 M
30 Ĵ

*Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ.*

**El Proverbaro Esperanta**

## Vortoj de la redakcio

Jen denove ĉi tie: finiĝis la plej «varma» feri-periodo, jam multaj revenis el diverstemaj Esperanto-renkontiĝoj kaj vivrutino ree envolvas nin en sia maŝo. Sed tutcerte pli fortigitaj, pli viglaj kaj agemaj, ĉar entuziasmo ŝargis nin per la necesaj energioj por ree aktivadi por nia afero.

Certe multon oni havas ankaŭ por rakonti, post la spertoj akiritaj kaj ĝuitaj en Esperantujo, kaj do, ni atendas senpacience aŭdi vian voĉon. Tial en la agendo, ĉiam vi trovos spacon por rakonti kaj prezenti viajn somerajn aventurojn.

Ĉio ĉi rilate al la distra parto de niaj aktivaĵoj: nun startas ankaŭ la momento por serioze programi estontajn laborojn, ĉefe pri organizado de kursoj. Ni bonvenigas tutkore viajn helpon kaj kunlaboradon, por ke Esperanto iĝu lingvo de la plimulto.

## Tie kaj tie pluketante...

Zorge de Elda Doerfler

Ĉe la eŭrop-unia fronto malĉesas la disputoj, la oponoj, la obstrukcoj pro lingva diskriminacio. Bataloj por akceptigo de propra lingvo pli kaj pli akriĝas kaj neniu cedas malfavore al propra lingvo. Prave, ĉar - sine de Eŭropa Unio - estas klare skribite kaj interkonsentite, ke ĉiuj lingvoj havas egalrajton.

Sed ne ĉiam tio estas la realo. Fakte, antaŭ la malfermo de kunsido de eŭropaj ministroj pri industrio en Oulu (Finnlando) okazinta komence de julio, reprezentantoj de Germanio kaj Aŭstrio anoncis sian malĉeeston, se oni ne estus enigintaj inter la laborlingvojn ankaŭ la germanan. Kial tiu minaco? Ĉar ordinare, kaze de «neformalaj» kunvenoj, kiel ekzemple tiu de Oulu, oni parolas (kaj interpretas) nur la lingvon de la gastiganta lando, plus la anglan kaj la francan, konsideratajn «vehiklajn lingvojn». Ĉi tiu decido estis alprenita jam antaŭtempe, pretekste, ke dum tiaj kunsidoj oni ne pritraktas tiom gravajn argumentojn, el kiuj devas rezulti ia specifa decido: oni nur interdiskutas, grandlinie, pri ĝeneralaĵoj, kaj ĉefe... turismas! Do, neceso pri interkompreniĝo estas malpli urĝa kj grava kaj ĝis nun nenia protesto!

Tio tamen vekas demandon: Se tiuj ministroj renkontiĝas por diskuti pri nenio, nur eventuale por turismi, dum tiuj kunsidoj eble la duono (aŭ eĉ pli) de ili nenion komprenas pri kio oni parolas, kial do la diversaj naciaj estraroj devas elspezi tiom da mono por esti reprezentitaj? Interalie, la mono venas el la poŝoj de la impostopagantoj, tutcerte ne el tiuj de la ministroj mem.

Konsentite pri tio, ni revenu al la ĉefa problemo. Berlino kaj Vieno ĉi-okaze deklaris militon (bonŝance senarmilan!) pro la flankenmeto de la germana lingvo.

Tiel diris la ministro Gerard Schroeder al sia kolego en Helsinki: «Se oni ne parolos ankaŭ en la germana, mi restos hejme». Kaj tiu promeso estis plenumita, kaj poste apogita ankaŭ de la aŭstria ministro.

Germanoj kaj aŭstroj iniciatis la tiel diritan politikan sistemon de «vaka seĝo» por elmontri sian kontraŭstaron al tiu diskriminacio. Kaj nun ekestas alia demando: kio okazos kiam, en ne tre malproksima estonteco, eniros Eŭropan Union la ŝtatoj de orienta Eŭropo? Tutan taĉmenton da interpretistoj-tradukistoj oni devos dungi, por kontentigi la justajn pretendojn de la reprezentotaj nacioj. Sed kiomaj la kostoj? Kaj kiaj la rezultoj? Sur tiu aranea reto, kiu disvastiĝadas arigante ĉiam pli da diversaj lingvoj, Eŭropa Unio estas konstruanta vere imponan Babelan Turon, se ĝi ne alprenos definitivan decidon pri akcepto de ununura, neŭtrala interkomprenilo.




## 7-a Turisma Semajno en Malto

Dum la pasintjara Universala Kongreso en Montpellier la diversnaciaj reprezentantoj decidis, ke la landaj asocioj ĉirkaŭ la Mediteraneo helpos igi la Esperanto-aranĝojn en Malto pli gravaj cele al ĉiam pli intensa kunlaborado inter si. Pro tio gravas multnombra partopreno en ĉi tiu 7ª Turisma Semajno en Malto okazonta ekde la 4ª ĝis la 10ª de septembro 1999. La insulo estas vizitinda, neniam tie pluvas, la esperantistaro estas aktiva kaj gastema: kio plia estas dezirinda?

Por havi pli da detaloj, vi povas korespondi paperpoŝte aŭ rete kun la sekretario de Malta Esperanto-Societo, John Vella Bondin, kiu volonte sendos al vi la programon kaj la aliĝilon. Poŝta adreso de la Societo: P.O.Box - Valletta CMR 01; retadreso: <maltaesp@global.net.mt> aŭ <johnvb@global.net.mt>



## Stelo-Moneroj

1959: Jubilea jaro de Esperanto. Kiel kontribuon al tia festado, Universala Ligo (UL) decidis aperigi metalan version de la jam uzata monunuo «stelo».

La 28ªⁿ de junio 1960 UL-estraranoj en la Nederlanda Ŝtata Monfarejo en Utrecht ĉeestis la aperigon de la unuaj moneroj. Sub la devizo «Unu mondo, unu lingvo» estis enkondukita por uzo de la membraro tia monunuo, ricevinta la nomon «stelo». Teorie 1 stelo havis valoron de 1 kg. da pano, sed praktike ĝia valoro estis ligita al la valoro de la nederlanda guldeno. Tiutempe 1 stelo egalis al Nlg 0,25. En 1960 estis faritaj moneroj de 1 stelo el bronzo, 5 steloj el latuno, 10 steloj el kupronikelo kaj en 1965 aldoniĝis la 25-stela monero el arĝento. En steloj estis fiksitaj la prezoj de varoj kaj servoj kaj dum longa periodo tio estis uzita en Esperantujo.

Nun eblas ilin aĉeti kiel memoraĵon de grava kaj kara parto de nia historio. Internacia Esperanto-Instituto havas je dispono monerojn de 1 kaj 25 steloj kaj ilia valoro estas respektive 1,10 kaj 32,05 Nlg. Al tio aldonendas la sendokostoj: Nlg 5,00, se registrite Nlg 11,50.

Kontakt-adreso: Iei - Riouwstraat 172, Nl-2585 HW Den Haag - fakso: +31 70358 44 22; ret-poŝto: iei@worldonline.nl



## Peto pri informoj rilate al lingvaj fuŝoj

En 1951 la Internacia Civila Aviada Organizo rekomendis (ne devigis) la universalan uzon de la angla, ĝis kiam ĝi povos plibonigi la rekomendon. Pro la malfacileco de la angla, multaj pilotoj kaj AerTrafik-Registoj ne sufiĉe klare kapablas paroli angle. El diversaj fontoj mi jam rikoltis liston de pli ol 15 mortigaj akcidentoj kun centoj da mortintoj, kiuj pli-malpli certe estis kaŭzitaj pro lingvaj problemoj.

Probable estas multoble pli da preskaŭ-akcidentoj, ĉefe en la ne-angleparolantaj landoj. Tiaj fuŝoj malofte aperas en dokumentoj aŭ ĵurnaloj. Estus granda helpo por ia estonta agado, se oni de tempo al tempo intervjuus aviadulojn. Kion ili pensas pri la angla por aviada uzo? Ĉu ili mem spertis problemojn pro komunikaj misaĵoj? Ĉiu citaĵo devas enhavi la nomon de la intervjuito kaj intervjuinto, daton kaj lokon.

Helpemuloj sendu rete al: kentjones9@aol.com aŭ poŝte al: Kent Jones - 5048 N. Marine, D6 - Chicago IL 60640 - Chicago, Usa

## Dimanĉon la 12ªⁿ de septembro Festo de Amikeco ĉe Dreiländerecke

Ne forgesu nian tradician renkontiĝon montpinte apud Arnoldstein! Kiel kutime ni atingos la festejon laŭ du vojoj: sportemuloj, piedire de la italia flanko, malsportemuloj, telfere de la aŭstria parto. Surmetu la Alp-Adrian T-ĉemizon! Jam sabate okazos renkontiĝo de fervojstoj-esperantistoj. Kiuj deziras pasigi la tutan semajnfinon en gaja kaj esperanta etoso, sinanoncu ĉe Tea-sekretario aŭ rekte ĉe Martin Stuppnig (tel. +32 4255 4083).

**Konata brazila gasto ĉe Tea**

Profitante de partopreno en Internacia Konferenco (li laboras ĉe Laboratorio Nacionale de Luz Sincotron en Campinas), **James Rezende Piton** restados en nia urbo de la 29ª de septembro ĝis la 9ª de oktobro. En la interreta sinanonco li jam deklaris sin preta prelegi ĉe nia asocio pri unu el la jenaj temoj: «Internet»; «E-filatelo: dokumentoj el nia historio»; «Brazilo». Ni klopodos, por ke li prelegu... pri ĉiuj! Se vi havas ian preferon, tamen, bv. informi nin kaj nepre ne maltrafu ĉi interesan renkontiĝon!

## 11-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco

Ĉu ankoraŭ vi ne aliĝis al ĉi Konferenco? Ĝi okazos de la 7ª ĝis la 10ª de oktobro en Pula, urbo histoririĉa, kun rimarkindaj romiaj spuroj, en regiono je milda temperaturo, apud la maro. Nia konferencejo kaj komforta tranoktejo troviĝas tute apud la Areno. La ekskurso al la insulo Brijuni igos nian kunvenon aparte neforgesebla. Eblas aliĝi ĉe Tea-kasisto: tuj anoncu vin.

Bulteno de la membroj de
Triesta Esperanto-Asocio
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# AŬGUSTO 1999

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 2 | 9 | 16 Bon | 23 | 30 |
| Mardo | | 3 | 10 | 17 | 24 | 31 |
| Merkredo | | 4 | 11 | 18 | 25 | |
| Ĵaŭdo | | 5 | 12 | 19 | 26 | |
| Vendredo | | 6 | 13 Bon | 20 | 27 | |
| Sabato | | 7 Suharai | 14 Bon | 21 | 28 | |
| Dimanĉo | 1 | 8 | 15 Ĉielen-preno de la Di-Patrino / Bon | 22 | 29 | |


# AŬGUSTO 1999

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 2 | 9 | 16 Bon | 23 | 30 |
| Mardo | | 3 | 10 | 17 | 24 | 31 |
| Merkredo | | 4 | 11 | 18 | 25 | |
| Ĵaŭdo | | 5 | 12 | 19 | 26 | |
| Vendredo | | 6 | 13 Bon | 20 | 27 | |
| Sabato | | 7 Suharai | 14 Bon | 21 | 28 | |
| Dimanĉo | 1 | 8 | 15 Ĉielen-preno de la Di-Patrino / Bon | 22 | 29 | |

**5759 Hebrea jaro**

**2559 Budhista Jaro**

**7 - Suharai** (Japanio).
Temas pri Festo de la purigado de la Granda Budho. En la urbo *Nara*, oni purigas la statuon, starantan en la orienta templo: ĝin oni kovras per interplekto da ŝnuroj, el kiuj pendas bambuaj ŝtuparetoj. La monaĥoj forviŝas la malpuraĵojn de la statuo per strioj el blanka ŝtofo kaj per balailoj. Krome ili oferas donacojn, preĝas kaj kantas honore de Budho.
**13-16 - Bon** (Japanio).
Festo-tagoj de mortintoj. Estas la momento, kiam la spiritoj de forpasintoj revenas en ĉi mondon. Por montri al ili la vojon, oni ekflamigas fajrojn kaj heligas per lampoj, kaj sur la hejma altaro oni oferas al ili fruktojn kaj dolĉaĵojn. En la tombejoj, oni purigas la monumentojn, ornamas ilin per floroj kaj honor-bruligas incensajn bastonetojn. La lastan tagon estas dismetitaj sur la akva surfaco lanternoj el blanka papero, en kiuj brilas flamo de kandelo. Irante laŭ la rivera fluo, tiuj akompanas la spiritojn de mortintoj al la transmondo.

**2055 Hinduisma jaro**

**1999 Kristana jaro**

**15 - Ĉielenpreno de la Beata Virgulino Maria (Katolika).**
En tiu tago oni rememoras la ĉieleniron, korpe kaj spirite, de Maria, la Patrino de Jesuo Kristo. En Italio ĝi koincidas kun la mezaŭgusta festo-tago.
**15 - Forpaso de la Sankta Di-Patrino (Ortodoksa).**

**1420 Islama jaro**

**5759 Hebrea jaro**

**2559 Budhista Jaro**

**7 - Suharai** (Japanio).
Estas la Festo de la purigado de la Granda Budho. En la urbo *Nara*, oni purigas la statuon, starantan en la orienta templo: ĝin oni kovras per interplekto da ŝnuroj, el kiuj pendas bambuaj ŝtuparetoj. La monaĥoj forviŝas la malpuraĵojn de la statuo per strioj el blanka ŝtofo kaj per balailoj. Krome ili oferas donacojn, preĝas kaj kantas honore de Budho.
**13-16 - Bon** (Japanio).
Festo-tagoj de mortintoj. Estas la momento, kiam la spiritoj de forpasintoj revenas en ĉi mondon. Por montri al ili la vojon, oni ekflamigas fajrojn kaj heligas per lampoj, kaj sur la hejma altaro oni oferas al ili fruktojn kaj dolĉaĵojn. En la tombejoj, oni purigas la monumentojn, ornamas ilin per floroj kaj honor-bruligas incensajn bastonetojn. La lastan tagon estas dismetitaj sur la akva surfaco lanternoj el blanka papero, en kiuj brilas flamo de kandelo. Irante laŭ la rivera fluo, tiuj akompanas la spiritojn de mortintoj al la transmondo.

**2055 Hinduisma jaro**

**1999 Kristana jaro**

**15 - Ĉielenpreno de la Beata Virgulino Maria (Katolika).**
En tiu tago oni rememoras la ĉieleniron, korpe kaj spirite, de Maria, la Patrino de Jesuo Kristo. En Italio ĝi koincidas kun la mezaŭgusta festo-tago.
**15 - Forpaso de la Sankta Di-Patrino (Ortodoksa).**

**1420 Islama jaro**

# SEPTEMBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 6 | 13 Ganesh Chaturthi | 20 Yom Kippur | 27 Sukkot |
| Mardo | | 7 | 14 | 21 | 28 Sukkot |
| Merkredo | 1 | 8 | 15 | 22 | 29 Sukkot |
| Ĵaŭdo | 2 Sri Krishna Janyanthi | 9 | 16 | 23 | 30 Sukkot |
| Vendredo | 3 | 10 Antaŭtago de Rosh Hashanah | 17 | 24 Zhongqiujie<br>Antaŭtago de Sukkot | |
| Sabato | 4 | 11 Rosh Hashanah (5760)<br>Cudus Yohanes | 18 | 25 Sukkot | |
| Dimanĉo | 5 | 12 Rosh Hashanah | 19 Antaŭtago de Yom Kippur | 26 Sukkot | |


# SEPTEMBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 6 | 13 Ganesh Chaturthi | 20 Yom Kippur | 27 Sukkot |
| Mardo | | 7 | 14 | 21 | 28 Sukkot |
| Merkredo | 1 | 8 | 15 | 22 | 29 Sukkot |
| Ĵaŭdo | 2 Sri Krishna Janyanthi | 9 | 16 | 23 | 30 Sukkot |
| Vendredo | 3 | 10 Antaŭtago de Rosh Hashanah | 17 | 24 Zhongqiujie<br>Antaŭtago de Sukkot | |
| Sabato | 4 | 11 Rosh Hashanah (5760)<br>Cudus Yohanes | 18 | 25 Sukkot | |
| Dimanĉo | 5 | 12 Rosh Hashanah | 19 Antaŭtago de Yom Kippur | 26 Sukkot | |

**5759/60 HEBREA JARO**

**10-12 - ROSH HASHANAH 5760 (NOVJARO)**. Ekas la nova jaro de la hebrea kalendaro. Tago de meditado: en la sinagogoj oni ludas la kornon de virŝafo (*Shofar*) por memorigi al la popolo pri la reveno al Dio. La postaj dek tagoj estas dediĉitaj al sinekzamenado kaj pentofaro. Estas kutimo, manĝi pomojn, mergitajn en mielo, kaj deziri «Bonan kaj feliĉan jaron».

**19-20 - YOM KIPPUR**. Temas pri tago de pekliberiĝo, koincidanta kun la fino de la pentofara periodo, kiu komenciĝis en la unua tago de la jaro. Ĝin karakterizas pentaj preĝoj, publika konfesado de pekoj, absolutaj ripozo kaj fastado.

**24-30 - SUKKOT**. Ĉi tiu festado daŭras unu semajnon, tial ĝi finiĝas la unuan de oktobro. Ĝi estas nomita ankaŭ «Festo de Tabernakloj». Origine ĝi estis unu el la festoj pri rikoltado: pli poste, ĝia signifo transformiĝis al memorigo pri la eliro de hebreoj el Egiptio, survoje al la Promesita Lando.

**2559 BUDHISTA JARO**

**24 - ZHONGQIUJIE** (Ĉinio). Ĝi estas mezaŭtuna festo. Vespere la familioj kunvenas por kuna vespermanĝo, post kio ĉiuj iras procesie, portante lanternojn el plej variaj formoj kaj koloroj, kantante kaj improvizante poezaĵojn, ĝis atingi la plej taŭgan lokon de kie admiri la lunon. Popola kredo diras, ke, se tiunokte oni sin elmetas al radiado de la luno, spiritaj kaj korpaj energioj ricevas pli da forto, pli facile akireblas bona sanstato, saĝeco, sereneco kaj ĝojo.

**2055 HINDUISMA JARO**

**2 - SRI KRISHNA JANYANTHI** - Naskiĝtago de la Dio *Krishna*, la oka enkarniĝo de *Vishnù* (Viŝnuo). La ceremoniaj ritoj komenciĝas per puriga sinbanado kaj preĝado. Dum la tuta tago, laŭlonge de la urbaj stratoj, paradas muzik-bandoj. Ope, la geinfanoj surscenigas epizodojn de la Dia infanaĝo. La festo kulminas vespere, kiam aperas la luno, simbolanta la naskiĝon de *Krishna*.

**13 - GANESH CHATURTHI** - Unu el la plej popolaj hinduaj festoj, celebranta la naskiĝtagon de *Ganesh* (Ganeŝo), la bonaŭgura dio, prezentita kiel malalta dika viro kun elefantorostro.

**1999 KRISTANA JARO**

**11 - CUDUS YOHANES (KOPTA)**. Festo de Sankta Johano, respondanta en Eritreo al la antikva kopta novjar-tago. Vespere oni ekbruligas torĉojn, faritajn per sekaj branĉoj aŭ kaktoj. Krome oni devas - tri fojojn - transsalti fajraĵojn, por ricevi bonŝancon. Dum la tuta nokto oni dancas kaj kantas; je mateno oni pretigas frandaĵojn: la tutan tagon daŭras la festado.

**1420 ISLAMA JARO**

**5759/60 HEBREA JARO**

**10-12 - ROSH HASHANAH 5760 (NOVJARO)**. Ekas la nova jaro de la hebrea kalendaro. Tago de meditado: en la sinagogoj oni ludas la kornon de virŝafo (*Shofar*) por memorigi al la popolo pri la reveno al Dio. La postaj dek tagoj estas dediĉitaj al sinekzamenado kaj pentofaro. Estas kutimo, manĝi pomojn, mergitajn en mielo, kaj deziri «Bonan kaj feliĉan jaron».

**19-20 - YOM KIPPUR**. Temas pri tago de pekliberiĝo, koincidanta kun la fino de la pentofara periodo, kiu komenciĝis en la unua tago de la jaro. Ĝin karakterizas pentaj preĝoj, publika konfesado de pekoj, absolutaj ripozo kaj fastado.

**24-30 - SUKKOT**. Ĉi tiu festado daŭras unu semajnon, tial ĝi finiĝas la unuan de oktobro. Ĝi estas nomita ankaŭ «Festo de Tabernakloj». Origine ĝi estis unu el la festoj pri rikoltado: pli poste, ĝia signifo transformiĝis al memorigo pri la eliro de hebreoj el Egiptio, survoje al la Promesita Lando.

**2559 BUDHISTA JARO**

**24 - ZHONGQIUJIE** (Ĉinio). Ĝi estas mezaŭtuna festo. Vespere la familioj kunvenas por kuna vespermanĝo, post kio ĉiuj iras procesie, portante lanternojn el plej variaj formoj kaj koloroj, kantante kaj improvizante poezaĵojn, ĝis atingi la plej taŭgan lokon de kie admiri la lunon. Popola kredo diras, ke, se tiunokte oni sin elmetas al radiado de la luno, spiritaj kaj korpaj energioj ricevas pli da forto, pli facile akireblas bona sanstato, saĝeco, sereneco kaj ĝojo.

**2055 HINDUISMA JARO**

**2 - SRI KRISHNA JANYANTHI** - Naskiĝtago de la Dio *Krishna*, la oka enkarniĝo de *Vishnù* (Viŝnuo). La ceremoniaj ritoj komenciĝas per puriga sinbanado kaj preĝado. Dum la tuta tago, laŭlonge de la urbaj stratoj, paradas muzik-bandoj. Ope, la geinfanoj surscenigas epizodojn de la Dia infanaĝo. La festo kulminas vespere, kiam aperas la luno, simbolanta la naskiĝon de *Krishna*.

**13 - GANESH CHATURTHI** - Unu el la plej popolaj hinduaj festoj, celebranta la naskiĝtagon de *Ganesh* (Ganeŝo), la bonaŭgura dio, prezentita kiel malalta dika viro kun elefantorostro.

**1999 KRISTANA JARO**

**11 - CUDUS YOHANES (KOPTA)**. Festo de Sankta Johano, respondanta en Eritreo al la antikva kopta novjar-tago. Vespere oni ekbruligas torĉojn, faritajn per sekaj branĉoj aŭ kaktoj. Krome oni devas - tri fojojn - transsalti fajraĵojn, por ricevi bonŝancon. Dum la tuta nokto oni dancas kaj kantas; je mateno oni pretigas frandaĵojn: la tutan tagon daŭras la festado.

**1420 ISLAMA JARO**